

## Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 19-an de decembro  
*Zamenhofa Festo*
- Lu, la 4-an de januaro  
*Cléa prelegos*
- Lu, la 1-an de februaro  
*Ĝenerala Asembleo*
- Lu, la 1-an de marto  
*Decidota*

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : [eventaservo.org/o/LES](https://eventaservo.org/o/LES)

## Lunde, la 2-an de novembro, je la 20-a en *Espace Dickens* en Laŭzano Francisko legos historietojn de « La Fantomoj de la Lago »

Elektu unu aŭ du, el la subaj resumoj, la versioj, kiujn ni malkovros kune.

«La Fantomoj de la Lago» estas libreto de kvin historietoj skribitaj de 13 verkistoj el nia societo.

Enkonduko  
*Geamikoj kebekaj venas ferii en Svislando. Ili "absolute" volas viziti iun restoracion apud la lago.*

Historio A  
La vidvino de Stefano transdonis al Mario kaj Liza la adreson de la restoracio "La Olda Ŝipo", kie okazas spektaklo pri fantomoj. Kial tiu ĉi?

Historio B  
Ernesto malaperis en la lemana lago. Maksimo kaj Dieter, restoraciestro de "La Du Amikoj", certas, ke li vivas. Kien serĉi lin?

Historio C  
Iam Luko aŭdis paroli pri fantomoj apud la restoracio "La Blanka Ĉevalo". Lia edzino Klara, ĵurnalistino, volas enketi pri la dronita kastelanino. Ĉu ŝi solvos la enigmon?

Historio D  
En 1951 la avo de Francisko aĉetis la

restoracion "La Blanka Kruco", antikva monaĥejo. Li renovigis ĝian kelon, kie oni trovis skeletojn, libron kaj oron en la muro. Ĉu la murdisto estas la Frato Jakobo?

Historio E  
En la infanlibro de Rikardo oni parolis pri juna fiŝkaptisto kaj maljunulo, kiu rakontas fantomajn historiojn pri la hotelo "La Granda Ursino". Gilberto estas la knabo en la libro. Kiu estas la maljunulo?

## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin  
ch. de la Vallombreuse 14  
CH - 1004 Lausanne  
sekretario@eo-l.ch  
+41 21 647 29 28  
facebook.com/esperantolausanne  
youtube.com ...esperantolausanne  
dailymotion.com/esperantolausanne  
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

### Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)  
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)  
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)  
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)  
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

### Babiladaj Rondo

ambaŭgrupe, je la 19-a:

**Ve, la 23-an de oktobro**  
ĉe Charlotte Blanc Maillard  
Avenue Nestlé 7, Vevey  
021 922 34 74 / 079 393 32 63



**Ve, la 13-an de novembro**  
ĉe Francisko Randin  
Vallombreuse 14, Laŭzano  
021 647 29 28 / 076 411 14 55



**Ve, la 4-an de decembro**  
ĉe Cléa Robin  
ch. Culaz 20, Vouvry  
024 481 33 06 / 079 330 04 03

### La Zamenhofa Festo

Ĉijare ni festos la naskiĝdaton de L.L. Zamenhof (15 déc. 1859) fonduumante ... sabate,  
**la 19-an de decembro**  
ekde la 11-a  
en *Auberge d'Epalinges*



**Bonvolu pagi al nia konto**  
CCP 10-26785-8,  
CHF 25.- por tiel aligi vin  
ĝis la 11-a de decembro.

## Karlo de Edmond Privat



## deknaŭa ĉapitro: Kuracisto

### HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. \_\_\_ martelo kaj amboso; 6. Por \_\_\_ kaj lerno ne sufiĉas eterne; 7. K; 8. Iuloken; 9. Hati (kontraŭo); 11. Konsonantoj de rido; 12. Nearbitra; 14. Azia bordo de la Egea Maro.

### VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Konvolvulo; 2. Por sperto kaj lerno \_\_\_ sufiĉas eterne; 3. Du, \_\_\_, kvar; 4. Por sperto kaj lerno ne sufiĉas \_\_\_; 5. Havanta formon similan al sfero; 6. Elekzameni; 10. Nedifinitan; 13. Unua silaba de jida.



	O	I	N	O	I
V	N	I	V	E	N
C	R		I	W	V
N	E	I		O	K
O	T	E	R	S	P
R	E	R	I	N	T

Ankoraŭ du jarojn studadis Karlo en la malsanulejoj de Bruselo, sed li revenadis hejmen por Kristnasko, por Pasko, por la someraj monatoj kaj ankoraŭ eĉ pli ofte. La edziniĝo de lia fratino Heleno estis unu el tiuj bonaj kaŭzoj por libertempo.

Ĉe tiu festo li la unuan fojon montriĝis oficiale kun sia fianĉino Alico Palam. Estis tre ĝojiga tago.

Ĉe la fino de sia lasta studjaro, Karlo prezentis ĉe la Universitato sian tezon pri "la influo de l' imagemo en la muskolaj malsanoj".

Sukcesinte kun honoro, li definitive revenis al sia hejma urbo.

Konsilate de sia patro, li luis ĉambraron sur la unua etaĝo de komforta domo tute proksime je la vendoplaco. Alico lin helpis por aranĝadi la ĉambraron kaj iliaj patrinoj sin okupis pri aĉeto de mebloj, tapiŝoj, kurtenoj, k.t.p.

Karlo deziris havi kelkajn artajn bildojn en sia hejmo. Alico donacis al li grandan kopion de la itala pentraĵo,

antaŭ kiu ili ambaŭ haltis samtempe en la muzeo, kiam ili estis geknaboj.

Per la amikoj kaj la konatuloj de ambaŭ familioj Davis kaj Palam, Karlo ekakiris kelkajn klientojn. Sian tezon de doktoro de medicino li vendigis en la librotutikoj de la urbo kaj per tio plikonigis sian nomon, kvankam la tezo ne pli vendiĝis, ol lia poemlibro. Pro lia granda kvieteco kaj certeco, Karlo tre rapide plimultigis sian klientaron. Li efektivigis kelkajn mirindajn resanigojn de nervaj personoj, kaj li ĉiam pli kaj pli interesiĝis je tiu psikologia parto de l' kuracarto.

Li interesiĝis je publika higieno kaj faris kelkajn paroladojn pri hejmozorgado, pri ordo en ĉiutaga vivado, pri reguleco en manĝado kaj dormado, pri efikoj de alcoholdrinkado, k.t.p.

Post ses monatoj li estis preskaŭ la plej ŝatata kuracisto en la urbo kaj jam estis plu nenia kaŭzo

por prokrasti lian edziĝon kun Alico Palam. Ambaŭ gejunuloj konsentis por ne havi bruan feston. Ili opiniis, ke oni ne edziĝas por la publiko. Laŭ ilia deziro la festo estis tute familia kaj intima, kaj kredeble pro tio speciale ĉarma. Sinjorino Palam havis tamen doloran momenton da plorado pensante, ke ŝi de nun ne plu havos kun si sian amatan filinon. Sed la feliĉo de Alico ŝin konsolis. Ŝi sukcesis iom forgesi tiun suferigan penson, ke ofte ies feliĉo kaŭzas la malfeliĉon de alia, kaj kio alportas rideton sur la lipojn de unu, ofte naskas larmojn en la okuloj de alia.

Post la edziĝa ceremonio, la feliĉaj geedzoj foriris por fari la kutiman vojaĝon.



## Intervjuo de Gilbert Darbellay, fideda membro de LES

(Fare de Francisko)

- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.

Mi naskiĝis la 11-an de novembre 1933 en Liddes (VS). Mi studis parte en Romont (FR) antaŭ reveni en Valezon, en Sion. Mi metilernadis kiel masonisto. Mi tutvive laboris en konstruejoj kaj emeritis ekde 1997.

- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?

En la jaroj 70-aj mia juna nevo Christian klarigis al mi pri esperanto, ĉar li sekvis la korespondajn kursojn de Claude Gacond.

- Kiam vi decidis studi esperanton?

Nur en 1985 mi aliĝis al la kurso organizita de la *Laŭzana Societo* kaj instruita de Nicole Margot.

- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?

Ĝis la jaroj 90-aj mi metis esperanton portempe malaktiva kaj de tiu momento mi decidis aliĝi al la *Laŭzana Societo* kaj plej ofte partopreni la kunvenojn.

- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?

Krom mia nevo mi konas neniu. Mia aktuala edzino ne interesiĝas pri esperanto sed male ŝatas akcepti *Babiladajn Rondojn* kaj organizi ilin niahejme en Morrens.

- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?

En 2009, post vojaĝo per trajno tra Germanio kaj Pollando, mi plezuris partopreni la 94-an UK-on en Bjalistoko (PL), la naskiĝurbo de L.-L. Zamenof (1859-1917).

